

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 12.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Pošta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

CENTRA ORGANIZAĴO DE LA ESPERANTISMO EN ĈEĤOSLO- VAKA RESPUBLIKO.

bh. Praha.

Sole la sisteme kaj laŭplane organizata laboro povas akceli la sukcesplenan kaj efikan rezulton sen troa perdo de la energio, tempo kaj mono. Tial disigitaj izoluloj penas unuigi en loka societo, tial ankaŭ la societoj serĉas apogon en la unuigo en unu centra asocio. Tiuj ĉi organizaĵoj devas nature respondi al realaj cirkonstancoj kaj bezonoj.

Se oni meditas pri la cirkonstancoj kaj bezonoj, kiuj estus kondiĉoj de la organizo de esperantistoj en Ĉeĥoslovaka respubliko, oni devas atenti kaj respekti la fakton, ke en tiu ĉi regno estas multenombraj esperantistoj ne sole ĉeĥoslovakaj, sed ankaŭ germanaj kaj magiaraj, eble ankaŭ (almenaŭ en la estonto) polaj kaj rutenaj. Ĉu oni devas fondi por ili unu solan organizaĵon por ĉiuj aŭ po unu organizaĵo per ĉiu aparte?

Por solvi tiun problemon oni devas pripensi la celon kaj karakteron de niaj societoj. Tiuj societoj estas propagandaj kaj kiel tiaj ili laboras por Esperanto inter neesperantistoj por gajni la neesperantistan popolon de unu nacio per rimedoj respondantaj al la naturo kaj psikologio de ĉiu nacio uzante do antaŭ ĉio ĝian lingvon, ĝiajn gazeton kaj literaturon ktp. Tiuj societoj, por kiuj Esp. estas celo de ilia penado, estas esperantistaj, sed ne esperantaj, kontraŭe ili estas naciaj, almenaŭ nacilingvaj. Laŭ tio oni vidas, ke propaganda centra asocio devas unuigi samideanojn de unu nacio kaj tial estas dezirinde, ke esperantistoj de ĉiu nacio organizu sin en aparta asocio laŭ sia naturo. Tiel efektive naskiĝis »Ĉeĥoslovaka esperantista asocio« kaj »Ligo de germanlingvaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio«, tiel

povus naskiĝi kaj certe naskiĝos asocioj magiara, pola kaj rutena, kiam nia movado enradikiĝos inter Magiaroj, Poloj kaj Rutenoj tiel forte kiel ĉe Ĉeĥoslovakoj kaj Germanoj.

Sed oni devas atenti kaj respekti la fakton, ke ankaŭ ĉe diverseco de sferoj kaj medioj de esperantista propagando, multaj propagandaj bezonoj kaj metodoj estas egalaj kaj komunaj, ke diversnaciaj kaj diverslingvaj samideanoj en unu teritorio, en unu regno havas komuna ne sole la ĝeneralan celon (esperanton), sed ankaŭ multajn specialajn celojn, speciale tiujn naskiĝintajn el la aparteno al unu ŝtato. Por paroli konkrete oni donu kiel ekzemplon: la enkonduko de esperanto en lernejojn de la tuta regno, la oficiala aprobo de nia afero en ĉiuj publikaj institucioj ktp. havas la egalan intereson por ĉiuj esperantistoj de la regno kaj postulas la komunan organizatan laboron de ĉiuj esperantistoj de ĉiuj nacioj. El kio rezultas la bezono de unu komuna organiza fundamento de ĉiulingvaj esperantistoj de la respubliko.

Kaj kiu povus esti la organiza fundamento de tiu laboro, kiun fari apartigite ne estus konsilinde? Komuna komitato aŭ konsilantaro konsistanta el nemultaj reprezentantoj perigus la kunlaboradon kaj unuecan intervenon (ne reprezentadon) en komunaj entreprenoj rilate la aŭtoritatojn, instituciojn ktp.

Sekve estas rekomendinde kaj dezirinde, ke estu fondataj naciaj propagandaj asocioj (ĉeĥoslovaka, germana, magiara, pola, rutena), kiuj laborus por esperanto inter sia nacio, kaj kiuj nomus delegitojn por komuna komitato aŭ konsilantaro de la esperantistoj en Ĉeĥoslovaka respubliko, kiu komitato perigus la interrilatojn inter la asocioj kaj iliajn komunajn entreprenojn. La komitato akceptadus la proponojn de unuopaj asocioj kaj prezentadus ilin

al la aliaj por pridiskuti ilin kaj poste komune efektiviĝi.

Certe estus superflue aldoni, ke tio rilatas sole propagandajn organizaĵojn, kiuj havas esperanton kiel celon kaj laboras inter neesperantistoj, sed ne rilatas la fakajn, ideajn kaj aliajn organizaĵojn, kiuj uzas esperanton kiel rimedon por alia celo kaj laboras ekskluzive inter esperantista publiko; en tiuj okazoj oni ĉiam povas fondi unu solan societon (ekzemple literaturan, turistan ktp.).

Kompreneble pri tio oni povas diskuti...

NACIA VIVO

F. J. HAVELKA:

JUSTECO*).

(Fino.)

Kun kapitano mi havis oftajn malkompreniĝojn pro la plendoj, kiujn mi prezentadis. La 8. aprilon mi estis translokita en Heimbürg-on. Tie oni fortondis al mi la harojn ĝis plena kalveco kaj eĉ sur mia seksorano volis tion fari, sed mi tion ne permesis. Post baniĝo oni forkondukis min, kovritan sole per kovrilo, en halon, kie estis komparanoj el Karpatoj kaj preskaŭ dek virinoj. Tie mi atendis du horojn antaŭ ol mi ricevis mian tolaĵon. Ĉio tie estis kovrita per malpuraĵo. Musoj kaj ratoj rampis sur nin ne nur nokte, sed eĉ tage, kiam ni kuŝiĝis. Ĉiutage ni povis promeni ekstere nur unu horon. Germanaj soldatoj nin brutale insultis kaj batis per kolboj. Nia peto, ke oni koncentrigu la inteligentulojn estis rifuzita.

6./XI. Oni alkondukis urbestron de Gorizia (Gorice, Görz) dron. Bombich, lian edzinon kaj pli ol 84 jaran ĵurnalistinon Pauline Luzzato, kiu malsaniĝas jam pli ol unu jaron! Siajn kvar infanojn devis dro. Bombich lasi en Gorizia kiel garantiaĵo al aŭstriaĵoj.

10./XI. Komisario ordonis ĝeneralan ordometon en ĉiuj ĉambroj de kio oni povis supozi, ke venos iu alta vizito aŭ iu komisiono. Je 1/2 h. alvenis blondulo en civila vesto de alta staturo, akompanata de unu uniformita oficisto kaj komisario S. Tiu sinjoro salutis nin germane kaj de-

*). So. F. J. Havelka, persona sekretario de ministro por popola provizado, aŭtoro de la libro »Zápisky z vyhnanství« (en la 1. no. ni ĉerare skribis »Vzpomínky z vyhnanství«) el kiu ni represas ĉi tiujn fragmentojn, atentigis nin, ke fraŭlino Gerovská kaj ŝia patrino estis Rusinoj kaj ne Polinoj. (Vidu La Progreso, januara no. 1920, paĝo 6. kvara linio de la unua kolono).

mandis kiel ni fartas. Estante por tio elektita de la loĝantoj de nia ĉambro mi parolis por la tuta fako. Mi diris, ke ni ne fartas bone, ke oni kondukas al ni kvazaŭ al krimuloj kaj ke ni suferas malsaton. Anstataŭ supo ni ricevas malpuran akvon. Por vespermanĝo ni ricevas du grandajn aŭ tri algrandajn terpomojn en ŝeloj. Tio estas ĉio. Kiu ne havas monon, tiu malrapide mortas pro malsato. Por tagmanĝo ni ofte ricevas »supon« kaj foliojn de salatkapo kiel ĉefmanĝo aŭ dishakitaĵojn leontodojn kun herbo, preparita kiel spinaco. Post kiam mi prezentis ankoraŭ aliaj plendojn, konsilis al mi la sinjoro, ke ni turnu nin al so. komisario S., kiu estas tre bonkora sinjoro. Mi respondis, ke tiu sinjoro neniam plenumas siajn promesojn kaj per tio la interparolo estis finita. La saman tagon ni sciigis, ke tiu sinjoro estis barono Beck, prezidanto de Helpa komitato por koncentretoj de militaj forkurintoj, vicprezidanto de aŭstria Ruĝa kruco kaj iama aŭstria ministrprezidanto — kaj fine, ke mi, Zelinka kaj instruisto Kračmar estos por puno translokitaj en Weyerburg-on, kie estas sole nur krimuloj kaj prostituistinoj. — (Poste oni decidis, ke en W. iros nur Zelinka kaj Havelka kun Kračmar estis senditaj en Raschala.)

20./I. Estis tie ĉi Mr. Penfield, amerika ambasadoro en Vieno, kun sia sekretario por intervui la regnajn Italojn kiuj laboris en Fischamend kaj estis tie turmentataj. Li agis tre energie kaj tute izolite li ilin demandis pri diversaj detalaĵoj. La laboristoj, ĉiuj italaj regnantoj, estis donitaj en diversajn fabrikojn kie ili devis labori de frua mateno ĝis malfrua nokto, nesciante kian pagon ili havos kaj ĉi-okaze ili estis batataj kaj arestataj. La nutrado estis tre malbona.

1./III. Adiaŭo kun dro. Vrbenský (la nuna ĉeĥoslovaka ministro por publikaj laboroj), kiu estas telegrafe vokita al milit-servo.

3./III. Vrbenský akompanata de detektivo revenis el Vieno, ili ne volas ĉin havi en la armeo; — nu tiom pli bone!

30./IX. 1915 oni internigis en Mittergrabern kelkajn Italojn, kiuj antaŭe estis transportitaj tra Leibnitz kaj Vieno en Oberhollabrunn. Tie ili devis pasigi la nokton en malliberejo pri kies malpureco kaj malordo rondiris raportoj preskaŭ nekredablaj. De tie oni sendis ilin en Sitzendorf, kie oni »purigis« ĉiun alveninton. Tiu »purigo« konsistis el tio, ke la vestaĵoj estis ĵetitaj en vaporkaldronon kaj poste redonitaj al iliaj posedantoj. Ĉar la Italoj apartenis al inteligentularo kaj pedikojn ĉe ili oni ne trovis, estis la

viroj liberlasitaj de alia ceremonio, tamen ne la virinoj: al sinjorino de P. kaj ŝiaj tri maturiĝantaj filinoj en ĉeesto de gardistoj razis dro. Peller la harojn sur seksorganoj dirante abomenajn »spritaĵojn«, kiujn oni ne povas ripeti. Kvankam tiu ĉi »ofica agado« ne okazis la unuan fojon kaj ĝi estis ĝenerale konata, eĉ la internigitoj prezentis skribe le plendojn, tamen okazis nenio por ŝanĝi la situacion. Fine en printempo 1916. komencis antaŭe disciplina kaj poste juĝa esplorado, kiu finis antaŭ la regiona juĝo en Korneuburg kaj divizia juĝo en Vieno — per liberigo de ambaŭ kulpuloj: dro. Peller kaj gardista Schlesinger. Rondiras la famo, ke dron. Peller defendis eĉ la Viena universitato, kiu trovis, ke li faris nur sciencajn studojn — — —.

Redakcia aldono: La de ni enpresitaj fragmentoj el la libro de samideano so. Havelka, kiujn ni tute hazarde elprenis, montras nur malgrandan parton de la barbara perfortado, kiu regis dum la tuta militdaŭro en Aŭstrio. »Hispana Esperantisto« tute prave skribas en sia marta numero, ke la legado de niaj fragmentoj devas instigi nin al tre aktiva por-esperanta laboro, ĉar nur per interkompreno malaperos similaj abomenindaĵoj...

○○○○

LA VII. ĈIUSOKOLARA KONGRESO

(26.—30. junio).

La gloraj tagoj de la bohema sokolara venos: jam post kelkaj tagoj ni havos la ĝojon ekvidi nian nacian simbolon de la forte, honesteco, disciplino kaj unueco. La sokolara armeo alvenos el ĉiuj anguloj de nia respubliko eĉ el fremdaj landoj en nian »oran Prah« por montri, kien kondukas la metoda kaj disciplinita korpokercado, kaj la morala edukato de la spirito. Jam la sciigo, ke la grandega areno akceptos ĉiutage 105.000 gastojn krom 10.112 samtempe gimmastikantaj sokoloj vekas en ni impresojn de admiro, eĉ se ni forgesos, ke la efektivigo de tiu ĉi grandioza entreprenado estis en la nuna malfacila ekonomia situacio laboro vere superhoma. »La kongreso estas granda lernejo de energio, enreprenemo kaj disciplino«, tiom diris »paĉjo Masaryk« kaj tiel sentas ĉiu bona filo de la bohema nacio.

Fremdlandoj gazetistoj laŭdezire ricevos de nia redakcio, aŭ de la »Sekcio por ekonomia kaj politika informado de la Ministerio por eksterlandaj aferoj« tute senpage **notojn kaj raportojn pri Ĉeĥoslovakio.**

La Progreso.

ESPERANTISMO

ENKETO PRI OFICIALA INSTRUADO DE ESPERANTO EN LERNEJOJ!

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, propaganda centro de Ĉeĥoslovakoj, bezonas plikompletigi sian respondon al informpeto de oficiala institucio pri tio, kie en eksterlandaj lernejoj estas instruata Esperanto laŭ decido de aŭtoritatoj.

Opinianta la antaŭmilitajn raportojn nesufiĉaj kaj sciante, ke dum la milito kaj precipe post ĝi, Esperanto estas instruata en multaj lernejoj laŭ ordono aŭ almenaŭ permeso de aŭtoritatoj, ni petas ĉiujn samideanojn, societojn kaj precipe naciajn propagandajn organizaĵojn: pri afablaj informoj, akcentante, ke tiaj informojn havos por nia celo valoron nur tiam, se ili respondos almenaŭ la jenajn punktojn:

1. preciza nomo de lernejo (en E. kaj nacia lingvo (eventuale klarigo pri speco de la lernejo,
2. en kiuj klasoj oni instruas,
3. kiom da lecionoj semajne,
4. kiu instruas (profesiaj instruantoj?,
5. kiom da lernantoj en pasintaj kursoj,
6. kiom da lernantoj en la nuna kurso,
7. de kiu jaro kaj monato oni instruas,
8. kiu aŭtoritato enkondukis la instruadon,
9. ĉu la instruado estas permesita aŭ ordonita,
10. en kiuj lernejoj oni instruis sed ne instruas nun,
11. Opinioj de lernejoj aŭtoritatoj en Via lando pri E.

Ju pli precizaj estos la informoj, des pli valora estos la rezultato kaj des pli multe ĝi efikos ĉe la oficialaj rondoj, kiuj en Ĉeĥoslovakio estas sufiĉe favoraj al E. — Kia estis la rezultato de la simila enketo farita de la Komitato preparanta la Universalan Kongreson de E. en Edinburg 1915? — Baldaŭan respondon bonvolu adresi al **Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha-VII., Sochařská, 333.**

○○○○

KURSA LERNOLIBRO

(Daŭrigo.)

Sesa leciono.

La kapo estas sur la ŝultroj. La haroj estas sur la kapo. Sinjoro Borel havas nigrajn harojn. Fraŭlino Denis havas blondajn harojn. Vi havas brunajn harojn. Mi ankaŭ havas brunajn harojn. La okuloj estas en la kapo. Ni havas du okulojn: la dekstran kaj la maldekstran. Vi havas blujajn okulojn. Sinjoro Borel havas brunajn okulojn. Ĉu fraŭlino Denis havas blujajn okulojn. Ĉu sinjoro Borel havas ni-

grajn harojn? Ĉu la sinjorinoj havas pli longajn harojn ol la sinjoroj? Kiu okulo tio estas, la dekstra aŭ la maldekstra? Kia okulo tio estas, bruna aŭ blua? Jen estas la dekstra orelo, jen estas la maldekstra orelo. Kiom da oreloj ni havas? Kiom da okuloj ni havas? La nazo estas inter la buŝo kaj la okuloj. La buŝo estas sub la nazo. Kie estas la nazo? Kie estas la buŝo? Mi havas brunajn harojn kaj vi havas blendaj harojn. Sinjoro Borel havas nigrajn harojn. Kian koloron havas miaj haroj? Kian koloron havas viaj okuloj? Ĉu fraŭlino Denis havas brunajn harojn?

La kolo estas inter la kapo kaj la ŝultroj. Vi havas du ŝultrojn. La dorso estas malantaŭe, sub la ŝultroj ni havas? Kia ŝultro tio estas? Ĉu la dorso estas antaŭe aŭ malantaŭe?

La brako, la mano, la fingroj. Ni havas du brakojn, la dekstran kaj la maldekstran. Ni havas du manojn. Ni havas kvin fingrojn sur ĉiu mano. Ni havas dek fingrojn sur ambaŭ manoj.

Ĉu via brako estas longa? Kiom da brakoj vi havas? Kiu mano tio estas? Kiom da fingroj vi havas sur via dekstra mano? Kiom da fingroj vi havas sur ambaŭ manoj? Ĉu vi havas krajonon en via mano? Jes, mi havas. En kiu mano vi havas la krajonon? Prenu la libron! En kiu mano vi havas la libron?

La kruro, la piedo, la genuo. Mi havas du krurojn kaj du piedojn. Kiom da piedoj vi havas? Ĉu tio estas la dekstra aŭ la maldekstra piedo? Vi havas la piedojn sur la planko. Mi havas la libron sur miaj genuoj. Ĉu vi havas la piedojn sur la planko? Ĉu mi havas la libron sur miaj genuoj?

La partoj de la korpo: La kapo, la vizaĝo, la nazo, la okulo, la buŝo, la mentono, la dorso, la kolo, la relo, la brako, la mano, la fingro, la kruro, la piedo, la genuo.

Sepa leciono.

Mi skribas literojn, mi skribas vortojn. mi skribas frazon. Jen estas litero, jen estas vorto, jen estas frazo. Kio ĝi estas, vorto aŭ litero? Kiom da literoj estas en la vorto «libro»? Kiom da vortoj estas en tiu ĉi frazo? Kiom da silaboj estas en la vorto «sinjoro»?

Jen estas litero A, jen estas litero B, jen estas litero C. Kiu litero ĝi estas? La alfabeto komencas per la litero A kaj finas per la litero Z. A estas la unua litero, B

estas la dua, C la tria, Ĉ la kvara, D la kvina, E la sesa, F la sepa, G la oka, Ĝ la naŭa.

A kaj E estas vokaloj. B kaj C estas konsonantoj. Ĉu P estas konsonanto aŭ vokalo? Ĉu O estas konsonanto aŭ vokalo. — Kioma litero estas D, la kvara aŭ la kvina? Ĉu V estas la lasta litero de la alfabeto? Per kiu litero komencas la alfabeto? Per kiu litero ĝi finas? Sur kiu ĝo komencas nia unua demiono? Sur kiu paĝo ĝi finas?

A estas antaŭ B, C estas post B. — C estas inter B kaj Ĉ. Kiu litero estas post H?

En Esperanto estas akcento sur antaŭ-lasa silabo. Vortoj unusilabaj estas sen akcento. Esperanto estas lingvo fonetika. Ĉar oni legas tiel, kiel oni skribas. La franca lingvo ne estas fonetika ĉar la vortojn oni tie alie skribbas kaj alie legas. Esperanto estas lingvo tre facila.

Angle legi ne estas facile, ĉar angla lingvo ne estas fonetika. Esperanton oni lernas tre facile. Ĉu vi parolas angle aŭ france? En London oni parolas angle, en Paris france, en Berlin germane, en Praha boheme kaj en Petrograd ruse. London estas ĉefurbo de Anglio, Paris de Francio, Berlin de Germanio, Praha de Ĉeĥoslovakio kaj Petrograd de Rusio. Ĉu vi estas Anglo, Franco aŭ Ruso? Li estas Germano, mi estas Hispano.

De, al. Prenu mian libron! Mi donas la libron al vi. Mi donas la libron al sinjoro Borel. Donu la libron al fraŭlino Denis. Fraŭlino Denis, donu la libron al mi. Donu la krajonon al ŝi. Sinjoro Borel donas la krajonon al fraŭlino Denis. Fraŭlino Denis, donu la libron al sinjoro Brun. Fraŭlino Denis donas la libron al sinjoro Brun.

Sinjoro Brun ricevas la libron de fraŭlino Denis. Li ricevas la libron de ŝi. Mi donas al vi la libron. Vi ricevas la libron de mi. Sinjoro Borel, donu la libron al sinjoro Brun. Sinjoro Brun ricevas la libron de sinjoro Borel. De kiu ricevas sinjoro Brun la libron? Al kiu donas sinjoro Borel la libron? (Daŭrigo.)

DIVERSAĴOJ

Ni atentigas niajn legantojn, ke la venonta numero (la sepa!) de La Progreso aperos en la unua semajno de septembro. Al ĉiuj niaj amikoj ni deziras agrablan pasigon de la somera libertempo. Preparu vin por intensa laboro vintra!

Nia »kröniko« estas de nun redaktata de ĝenerala sekretario de Ĉ. A. E. so. Rud. Hromada, Praha VII., Sochařská 333 kaj tial ni petas sendi la raportojn pri nia enlando movado esp. sole al li ĉar nia redakcio ne povas ilin propravoje enpresii!

Represoj el La Progreso. La peno de nia redakcio prezenti al la legataro artikolojn kaj raportojn de ĝenerala intereso estas aprobata per la fakto, ke multaj naciaj gazetoj volonte represas niajn raportojn, intersanĝas sian gazeton kun la nia aŭ abonas La Progreso. Jen ni prezentas la eblecon akiri la simpatian de naciaj gazetoj por Esperanto: Traduku interesajn artikolojn aŭ notojn kaj sendu ilin al naciaj gazetoj de via loko, citante ilian esperantan devonon! Tiel vi turnos atenton de la legataro al Esperanto kaj vi pruvos, ke ĝi jam ludas gravan rolon en internaciaj rilatoj. — Du bohemiaj tagjurnaloj: »Tribuna« (Praha) kaj »Nová Doba« (Plzeň) alportis siajn proprajn tradukojn de la artikolo »Mi kaj ĉeĥa lingvo« (de Aitaró Jமானoj), kiun ni enpresis en nia lasta kajero. Magiara gazeto »A Hírek« en Komárno enpresis raporton pri enkondukto de Esp. laŭ nia artikolo en nia febr.-marta numer. Same agis ankaŭ la gazeto »Híradó« en Bratislava. La gazeto »A Hírek« ofte enpresas esperantajn novaĵojn. — Hispana semajna gazeto »Heroldo Escolar«, organo de instruista asocio, aperigis longan artikolon pri Masaryk, verkita laŭ nia speciala numero de Masaryk. — Ankaŭ hebrea gazeto »Dos naje Lebn« kaj kelkaj aliaj uzis la saman fonton por siaj raportoj pri nia prezidanto.

Kio ĝi estas? Ni ricevis karton kun jena enhavo: »Mi petas, bonvolu sendi al mi unu aŭ du numerojn de Via ŝatinda revuo por propagandaj celoj, t. e., ke mi povu montri al ĉi ties publiko, ke la lingvo internacia daŭras disvastiĝi en la mondo. Kore Vin salutas kaj dankas antaŭe: profesoro F. V. Lorenz, S. Feliciano.« — So. prof. Lorenz estas la eldoninto de la unua esp. lernolibro por bohemoj (ĝi aperis jam en 1891) kaj niaj idistoj faras multe da bruo, anoncante de li transiris al Ido. Kaj sekve jen estas interesa problemo: Ĉu so. prof. Lorenz estas esperantisto aŭ idisto? Kaj se li estas idisto, ĉu li per esp. gazetoj konvinkas la publikon pri prosperado de la lingvo internacia — Ido?

Liberpensuloj-Esperantistoj, kiuj partoprenos la 18an internacian kongreson de Libera Penso en Praha (5.—9. de septembro 1920) uzu ekskluzive Esperanton en siaj skribaj kaj personaj rilatoj kun la kongresa komitato. Se vi intencas fari raporton aŭ konferencon, faru ĝin en esperanto! Dek esperantaj aliĝoj havas pli grandan efikon ol longaj teoriaj artikoloj. Tial ne skribu nacilingve! Ĉiu kongresonto estas krom tie petata sciigi sian alvenon al »Esperantista Klubo en Praha«, kafejo Union, strato Národní.

Ĉeĥoslovaka esperantista informejo (sidejo: Sochařská 333, Praha VII., Ĉeĥoslovakio), societo fondita por perigi inter Ĉeĥoslovakio kaj aliaj nacioj la reciprokajn rilatojn kaj sciojn pri propraj nacio kaj ŝtatoj, eldonis kaj en la tutan mondon dissendis esperantan bro-

ŝuron »La unua prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko T. G. Masaryk« (ĉeĥe verkis Jar. Čisář, esperanten tradukis Rud. Hromada), kiun multaj samideanoj de diversaj landoj legis en kunvenoj kaj tradukis en ĵurnaloj, kiel atestas multegaj leteroj kaj kartoj ricevita de la informejo el ĉiuj landoj. Pri sia celo kaj laborplano la societo eldonis boĥeman flugfolion »Organisace zahraniční informace a propagandy« (verkis H. K. Bouška, prezo 10 hel), dissendataj al ĉiu grava societo aŭ eminenta individuo. hh

Universala Junula Esp. Asocio estis fondita la 12. de marto. Ĝiaj celoj estas progresigi kaj propagandi esp. movadon inter junularo kaj servi al la tutmonda esp. junularo. La kotizajo estas 5.— Kč, de kiuj tuta duono estos uzita por propagando. Kiu sendos 60 hel. markon al so. Ferd. Medek, Brno, Česká ul. 6 (konsule por Ĉeĥoslovakio), tiu ricevos ĉiujn informojn. La prezid. de U. J. E. A. estas so. Geoffrey Crowther, Offchurch Bury, Leamington Spa, Anglio.

Ekzamena komisiono de Ĉ. A. E. volante faciligi al kandidatoj la necesajn formalajn, decidis akcepti iliajn aliĝojn dum la tuta jaro kaj kunveni por ekzamenoj ĉiam, kiam sin anoncos necesa nombro da kandidatoj. — Tial ni rekomendas al ĉiuj, kiuj bezonas aprobon de la komisiono, ke ili tuj petu detalajn informojn kaj poste menuu la sendon de la hejma skriba laboro. Ĉiujn informojn sendas prezidanto de la komisiono dro. Stan. Kamarýt, prof. en Bratislava, Tělocvičná 3.

ooo

VIZITO ĈE MINISTRO SO. HABRMAN.

Le 18. junion t. j. vizitis ĉs. ministron de instruado son. Habrman la deputacio de la Ligo de germanlingvaj esp. societoj (ĝia prezid. so. ing. Scholze kaj prof. Süßer el Deutschgabel), kiun enkondukis red. La Progreso so. Tittl. por prezenti plendon, ke la petskriboj de kelkaj lernejoj pri permeso instrui Esp. kiel nedevigan objekton, kiun oni sendas al la ministerio de instruado per t. nom. dejora vojo estas detenataj per subalternaj oficoj tiel, ke eĉ post kelkaj monatoj oni ne decidis pri ili. La deputantoj citis kelkajn konkretajn okazojn, kie tiel okazis al germanlingvaj mezaj lernejoj kaj so. Tittl. menciis, ke eĉ la II. burĝa lernejo en orienta parto de Plzeň, kie oni instruas Esp. jam de februaro, ankoraŭ ne ricevis decidon pri sia petskribo forsendita en decembro. Oni akuzis, ke en sovjeta Rusio, post trastudo de Esp. per speciala komisiono, kiu konstatis ĝian nepran vivkapablon kaj praktikecon, oni enkondukas Esp. kiel devigan objekton en ĉiujn lernejojn de Rusio. ke oni enkondukas Esp. kiel nedevigan en la lernejojn de Aŭstrio kaj Saksio, ke oni ĝin instruas en multaj lernejoj de Brazilio, Anglio, Ameriko, Danio, Hispanio k. a. kaj sekve ke ne ekzistas kaŭzo por kontraŭstari enkondukon de Esp. ankaŭ en la lernejojn en ĉs. respubliko.

So. ministro respondis, ke li mem estas jam de kelkaj jaroj amiko de Esp. kaj ke li subtenas ĝian enkondukon en lernejojn. Li rekomendis al la plendantoj sendi al li skribe la datojn pri la neresponditaj petskriboj, ke li povu akceli ilian oficialan aprobon kaj li promesis informi la sub-

alternajn oficojn pri la vidpunkto, kiun ili en estonteco okupu.

Instruistoj! Klopodu enkonduki Esp. en viajn lernejojn! En tiurilataj bezonoj turnu vin al nia redakcio, kiu donos al vi gravajn informoj. Agu tu!

M. JAHN:

Bona homo.

Foje mi eliris frue matene, dum ankoraŭ estis roso. Estis ĵus la tempo de fojnorikolto.

La aero estis pura kiel kristalo, la koturnoj vokis, la kampoj elspiris freŝecon. La arĝenta plenluno kliniĝis al okcidento, sed oriente jam brilis tra la horizonto la unuaj radioj de la nova suno.

Dumvoje mi renkontis homon. Li iris kun falĉilo direkte de la herbejo. Lia vizaĝo estis maldelikata kun nuba fizionomio, sed liaj okuloj brilis de roso kaj li odoris entute laŭ herbo. Li rapidis sed tamen li haltis:

»Dio donu bonan tagon«, li salutis.

Mi dankis.

»Jam finfalĉite?« mi demandis.

»Ho mi tie falĉis »en valoj« la herbejon de la najbaro kaj nun mi iras al la mia«, respondis la homo simple.

Ĉi tiu najbaro jam dum tri semajnoj estis malsana — tifo lin turmentis. Kaj tiam alia homo kompleze dum luna nokto falĉis lian herbejon. Prefere lian kaj poste sian. Tial li leviĝis frumatene.

»Bele«, mi diras, premas lian manon kaj foriras, ĉar la homo ne ŝatas vantajn vortojn. Sed kian senmezuran estimon mi sentas al ĉi tiu bona homo!

Tradukis A. Hrdinová.

KRONIKO

Memoru, ke, la kroniko devas prezenti la historion de la movado, el kiu ankaŭ eksterlandaj samideanoj povu ĉerpi informojn. Raportu al ĈAE (ne plu al la red. de la Progreso) pri fondo de Klubo, pri programa kunveno, propaganda parolado aŭ artikolo ktp. Skribu koncize sed precize!

Membra kunveno ĈAE estas aranĝata dum la Sokola kongreso en Praha la 28-6 je la 8 horo vesp. en kaf. Union, Národní tř. Ĉiuj samideanoj estas kore invitataj. Kiu venos dum Slet al Praha, bonvolu nepre informi pri tio sekr. Rud. Hromada, Praha VII., Sochařská ul. 333.

Instruistoj, kiuj instruas E. oficiale kun la permeso de la ministerio estas petataj sendi al Asocio kopion de la koncernanta permeso.

Komercaj, bankaj oficistoj sciigu siajn adresojn al Ĉ. A. E. Estas planata internacia organizaĵo, kies unu tasko estas: ellabori komercajn vortarojn.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. La 1-6. kunvenis la Praha-aj komitatanoj de ĈAE. Partoprenis Eiselt, Hromada, Novák, Pitlík, Šupichová, kiel gastoj Bouška kaj Weiner. Ĝi sekretario raportas pri la laboro farita: Estis dissendita demando al kluboj pri la agado de post la 1-10. 1919. Kun Esp. Klubo en Plzeň oni traktis pri ties propono eldonadi Progreson en Praha. Privozore ĈAE disponas pri 2-3 kolonoj en ĉiu numero kaj gvidos

Kronikon. Sekve de la propono de prof. Raudnitz (E. estu instruata en burĝaj lernejoj en Praha, de post la komenco de la venonta lerneja jaro) estis sendita al ĉiu membro de la urba reprezentantaro propagandaj pri E.

Pedagogia instituto (duoficiala institucio de la ministerio por instruado) petis la Asocion pri informoj, kie en la frendlando E. estas instruata en lernejoj. Detalan respondon skribis Bouška. Por akiri freŝajn datojn ĈAE aranĝas

internacian enketon pri la oficiala instruado de E. en lernejoj. (Vidu aliloke). Teksto de tiu enketo estis dissendita al ĉiuj E.-gazetoj, kiuj estas petataj publikigi. Estas atendataj respondoj, ĉar la afero estas grava.

Okaze de la enketo farigi de la ministerio de instruado pri la reformo de la duagrada (mezaj) lernejoj, ĈAE sendis al la ministerio proponon, ke »En la estonta meza lernejo oni devige instruu E.; en la 4a klaso 3 lecionoj semajne, en la 5a kaj la 6a po 1 horo«. La proponon verkis Dro Kamaryt, subtenante ĝin per tre rimarkindaj motivoj pedagogiaj.

Laŭ instigo de f. instr. Šupichová Ĉ. A. E. rekomendis al instruistaj organizaĵoj aranĝi kursojn por iliaj membroj, kiujn gvidus Ĉ. A. E.

Laŭ propono de dir. Eiselt okazos parolado pri E. antaŭ gestudentoj de mezaj lernejoj de Praha.

Ekzamena komisiono konsistas el ges-oj: Bouška, Eiselt, Hromada, Dr. Kamaryt, Šupichová. La komisionon por Moravio konstituos la moraviaj samideanoj mem. Plej proksima termino Slet kaj poste en septembro.

ĈAE invitas la XIII. universalan kongreson de Esperanto al Praha por 1921. Se K. K. K. kaj la Haaga kongreso akceptos, la preparaj laboroj komenciĝos ajtune.

Laŭ la propono de E. Grupo en Užhorod, ĈAE — post interkonsento kun ceteraj propagandaj centroj sendos al la ministerio de poŝtaj aferoj proponon, ke al la venonta internacia kongreso poŝta estu prezentita la propono pri malpligrandigo de afranko por esp-aj korespondantoj.

Servoj de E. estis proponitaj al la aranĝantoj de la Specimena Foiro (de Weiner kaj Hromada) kaj al la XVIII. universala kongreso de la Libera Penso (de Janda kaj Hromada) ambaŭ en Praha, septembro 1920. Ambaŭ akceptis uzi E. por sia propagando. Flugfolioj esp-aj estas presataj.

Al diversaj demandoj oni konstatas: ĈAE estas propaganda (kaj sekve de tio nacia) organizaĵo de Ĉeĥoslovakoj. La germanaj samideanoj loĝantaj en nia respubliko fondis sian Ligon. Ĉar la movado inter magiaraj kaj rutenaj minoritatoj estas ankoraŭ tro maliorta, samideanoj de tiuj ĉi nacioj estos kore akceptitaj kiel plenrajtaj membroj de ĈAE, kie ili trovos ĉiun helpon por sia propagando. Al la magiara klubo en Užhorod estis senditaj ĉiuj disponeblaj mag. ŝlosiloj de Ĉefeĉ, donacitaj de F-ino Šupichová. R. H.

Praha. Esp. Klubo: La 12-4. parolis So Hromada pri H. Hodler. La 28-5. estis aranĝita tre interesa parolado de so V. Cimr: La

dum milita restado de la ĉefaj partoprenantoj de la Pariza kongreso en Hispanio dank al la servoj de E. kaj de UEA. So Ĉimr precipe rememorigis dankeme Gen. Sébert en Parizo, kiu multe helpis la ĉefajn samideanojn en la unuaj tagoj de la mondmilito kaj ebligis al ili forveturon al Hispanio. La 4.-6. kelkaj membroj de E. K. kunvenis kun la germanaj samideanoj de Praha en kaf. Edison. Tiuj ĉi (5p.) vizitis siavice la kunvenon de la Klubo la 11.-6. Junularo de la Klubo kunvenas trifoje dum semajno. Preskaŭ ĉiudimanche ili aranĝas ekskursojn. Esperanta konversacio.

Rondeto de Esp-istinoj aranĝis 14.-3. amuzan vesperon. Partoprenis ankaŭ So Socha el Radim, unu el la plej malnovaj esp-istoj ĉefaj. La 24.-5. ekskurso al Tuklaty. Partoprenis rusa samideano Elioviĉ el Harkov. La 30.-5. parolado de F-ino Šupichová: Esperanto kaj junularo. (40p.) Debato. De majo la E. R. kunvenas krom lunde (en Ženský výrobní spolek) ankaŭ ĉiusabate en »Zlatá studně«, ĉarma loko super Malá Strana, sur la deklivo de la kastelo. Ĉiu samideano estas bonvenata.

Budějovice. Klubo en boh., esp-istoj (36m.) kunvenas ĉiusabate en I. boh. knaba burĝa lernejo. Prez.: Fr. K. Svačina, faka instr., Sekr.: Vojt. Matouš, komercisto. Ministerio de instruado permesis al so Svačina instrui E. kiel nedevigan objekton en II. boh. burĝa lernejo por knaboj (11—14 jaroj), en la dua semestro 1919—20, du horojn semajne. Informejo pri E. troviĝas en la komercejo de la sekretario. Grandega afiŝo atentigas la publikon. Multe da aliĝoj por la aŭtuna kurso.

Hradec Král. Samideanoj, varbitaj per la senlaca laboro de So Sklenčka, del. de UEA, oficisto de Živnobanka, kunvenas ĉiumerkrede en E. Rondeto, rest. Beseda. Estis aranĝita publika kurso (okt.—jan.) en ĉambro de la Komerca Akademio (56p.) Alia kurso de marto-junio, nur por plenaĝuloj, 46p. En la urbo estas abonitaj entute 75 esp. gazetoj! La 16.-5. oni ekskursis al Ratibořice kaj Babiččino údolí. Partoprenis 9p. el Hradec, 36p. el Červený Kostelec kaj 5 el Jaroměř.

Kostelec n. Č. Lesy. Kun permeso de la ministerio kaj lernejojficaj instruas E. en burĝa lernejo del. de UEA, faka instr. B. Ludvík 29 gelernantojn, kiuj nun vigle korespondas kun anglaj, danaj, germanaj, francaj kaj sudamerikaj gelernantoj.

Kostelec Červený. La 16.-5. ekskurso al Ratibořice (36p.).

Litovel (Mor.) Kurson por studentoj aranĝis prof. Kl. Urban; Rondeto (10p.) kunvenas semajne en ĉambro de la reala gimnazio.

Brno. Esp. Klubo aranĝis kurson por blinduloj en aprilo-junio, gvidis ing. Kroužil kaj Kozák (40p.) Alia kurso por lernantoj de la germana komerca akademio, gvidis So Podloučka (11p.) En la membra kunveno (marto 1920) parolis vicprez. ing. Kroužil: Vidpunkto de prof. Meillet rilate la lingvon artefaritan. La sama parolis en marto antaŭ gelernantoj de la industria lernejo pri E. Estis aranĝitaj 3 ekskursoj.

Olomouc: E. Societo aranĝas du kursojn (ĉefan kaj germanan) por fervojistoj, instruas So Horák. Kunvenoj dusemajne marde. Dum

la Pasko (4—5 apr.) kunveno de moraviaj samideanoj. El la tre interesa kaj detala raporto, verkita de so prof. Fridrich el Prostějov, kiu pro multo da materialo ni ne povas publikigi tutan, ni citas: Partoprenis 55p. Rezultatoj: E. Societo ricevos por vendalo reston de libroj de Ĉejka nun bindataj. Ges-oj Janalíková, Šupichová, Ĉejka, Fridrich, Guth kaj Neužil kolektas tekstojn por eldonota legolibro sur apartaj folioj. Estu restarigita iama moravia ekzamenata komisiono. Oni parolis pri propagando en komercaj rondoj. Vespere estis amuza kunveno.

Zlín. E. Klubo kunvenas ĉiuvendrede en la rest. Klinkovský. Kvaran kurson gvidas so Tomarčák.

Bystřice p. H. La 8.-6. estis restarigita Rondeto de esp-istoj, kiu kunvenas ĉiumarde en la burĝa lernejo. Prez.: f. instr. Minářiková, VP: Th. Ĉejka, Sekr.: f. instr. A. Janalíková, vigla propagandantino, kiu parolis pri E. en kunvenoj de geinstruistoj en Bystřice p. H., Holešov, Val. Meziříč, Vizovice, Vyškov; publika paroladoj en Zlín kaj Vyškov. La 2.-5. parolado de V. Ĉimr pri la vivo en Hispanio dum la milito.

Lučenec (Slov.) Sam-oj el Lučenec kaj ĉirkaŭa aligulo al Alea E. grupo, fondita en 1919 de Jul. Halász, VD, Lučenec, Tisztviselő Telep. Kurson gvidas so Weisz. Alia kurso en la reala gimnazio.

Užhorod (Ungvár, Slov.) E. grupo havas 20m. Prez.: D-ro Andreo Szöke, Sekr.: Al. Spire. Kurson de la 1.-6. gvidas laŭ la metodo Berlitz D-ro Szöke (80p.). Propagandaj artikoloj en lokaj gazetoj.

0000

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresko kostas Kĉ. 1.—)

Plzeň (Ĉeĥoslovakio). So. Pavel V a c e k, Rokycanova 22, ano de Spiritista klubo en Plzeň, — deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri spiritismo — speciala el Lyono en Francio.

Praha VII. (Ĉeĥoslovakio), Skuherského ul. 32. So. Jaroslav S o m m e r interŝanĝas il k. kaj. p. m.

Praha-Nusle (Ĉeĥoslovakio). So. Jan M i k š, Jaromírova str. 494, — deziras korespondi, eventuale ŝanĝi p. m. kun Jugoslavio, Turkio, Grekio, Afriko, Meza Ameriko, kun kolonioj kaj insuloj de ĉiuj landoj. Li ĉiam tuj respondos!

Bohnice ap. Praha (Ĉeĥoslovakio). So. Ant. Č e r v e n k a, vartisto en instituto — deziras korespondi kun socialistoj kaj komunistoj, plej volonte alilandaj. Li ankaŭ interŝanĝas p. m.

Postřelmůvek apud Zábřeh (Ĉeĥoslovakio). So. Jos. B a d a l — deziras interŝanĝi vidaĵkartojn, markojn bildflanke.

Siač. Gemer. župa (Slovakio). So. Jos. Otto, ĉs. p. pl. č. 5, I. rota — deziras interŝanĝi il. p., leterojn, kaj gazetojn.

Něm Brod (Ĉeĥoslovakio). K. Pospíšil, gimnaziano, — deziras koresp. kun fremdaj kaj enlandaj studentoj filatelistoj.

Jokohama (Japanio) Sanĉome Honĉo. So. Tej Nišikawa — deziras korespondi per p. k.

Bailleul, Nord (Francio). Fino. L. Lebleu, Route d'Ipres, Asile des Aliénés — interŝanĝas p. m. Certa respondo.

Kiu scias ion pri so. Vladimír Špilár, kadetaspiranto de la 28 regim., kiu estis militkaptita la 3. aŭ 4. aprilon 1915 en montpasejo de Dukla? Lia servisto sciigis el Rusio, ke li estis ne grave vundita kaj kaptita. Rusa kaptito el Štěchovice apud Praha, reveninta hejmen en 1918 asertas, ke li korespondis kun li laŭ la adreso Kyjev II., Dační Šulavka. Lian adreson ii legis en gazeto »Ĉeĥoslovák« el majo 1917. Laŭ alia sciigo li loĝis ankaŭ en Kazaň. Kiu ajn sciigon oni sendu al lia patro: So. Miroslav Špilár, vrchní sládek měst. pivovaru, Pelhřimov.

BIBLIOGRAFIO

Pri la teruraj okazintaĵoj en la plebiscita regiono de Těšín (germ. Teschen, pole Cieszin) informos Vin la kvar germanlingvaj broŝuroj eldonitaj de la presa oficejo de la Silezia popola partio (Pressestelle der schlesischen Volkspartei: 1. Polnische Presselügen, 2. Denkschrift der Schl. Volkspartei an die Interallirte Volksabstimmungskommission in Teschen, 3. Polnische Kulturschande am Teschner Abstimmungsgebiet, 4. Ein Not- u. Hilferuf! Beschwerde-Eingaben der Schlesi-schen Volkspartei an die Internationale Volksabstimmungskommission in Teschen, betreffend poln. Greuel-taten und Terrorakte. — La broŝuroj prezentas malesperan ekkriion de la subpremata kaj mortigata nacio »ŝlonzaka« al la kultura mondo kaj legante ilin oni miregas kiaj teruraĵoj ankoraŭ nun okazas en mezo de Eŭropo. — Mendu ilin ĉe: Pressestelle der Schlesi-schen Volkspartei, Schl. Ostrau, Hotel National, Herrn Koždoň.

Objednejte si slovník Esperantsko-český

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.
Cena brož. Kč 4.—, v plátně váz. Kč 7.—.

Laŭ interkonsento kun la eldonantaro de

ESPERANTA FINNLANDO

estas tiu bela kaj riĉe ilustrata gazeto abonebla por Kč 24.— jare ĉe

Administracio de „La Progreso“
Plzeň Poděbradova 6.

Somero 1920 Ĵus aperis 2.-a eldono

BĚS-a

ADRESARO de l'Esperantistoj el ĉiuj landoj

Prezo: 6.— Kč
(fremdlande: 1.50 Fr. sv., pagebla papermone, poŝtmarke aŭ respondkuponoj).

Rabato por opaj mendoj.

BOHEMA ESPERANTO-SERVO
Moravany, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, Eŭropo.

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 2.70 Kč, 100 kusů 24.— Kč.

Vešk. informace o Esperantu

přináší brožurka J. ŠUPICHOVÉ, kterou vydal „Kroužek esperantistek“ v Praze:

Učte se Esperantu

Cena 1 výtisku poštou 60 h, při větší objednávce sleva. Objednávky vyřizuje sekretářka Kroužku sl. Sidonie Dlouhá v Praze, Wilsonovo nádraží

„LA PROGRESO“

en la nuna jaro kostas 12.— Kč aŭ 2.— Svisajn Frankojn.

La fremdlandanoj abonon ĉe la „Universala Esperanto-Asocio“, Bern, Museumstr. 14.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.